

Marc van Oostendorp

Radboud Universiteit, Nimego, Nederlando

Wim Jansen (1948–2024)

Nekrologo

Resumo: La renoma interlingvisto Wim Jansen forpasis en februaro 2024. Li estis konata pro siaj publikajoj pri la Esperanta gramatiko kaj pro sia multjara deĵoro kiel profesoro pri Interlingvistiko kaj Esperanto en la Universitato de Amsterdamo, sed li ankaŭ estis inĝeniero pri spacteknologio kaj specialisto pri la eŭska lingvo.

Ŝlosilvortoj: Wim Jansen; Esperantologio; esperanta gramatiko; funkciogramatiko

La konata esperantologo kaj interlingvisto Wim Jansen forpasis la 2an de februaro 2024 post mallonga malsano. Esperantologoj verŝajne plej konis lin pro lia laboro kiel docento, poste universitata profesoro pri Interlingvistiko kaj Esperanto en la Universitato de Amsterdamo (Nederlando). Li tenis tiun postenon inter 2002 kaj 2013, kaj kun granda sukceso. Li estis mia postulo – mi estis la unua katedestro – kaj multrilate li estis pli sukcesa ol mi en tiu posteno, ekzemple por altiri studentojn. Jansen instruis kurson pri interlingvistiko kaj enkondukis kurson de Esperanto por studentoj el ĉiuj fakultatoj de la universitato. Li interalie ankaŭ estis ekstera referanto de la doktoriĝa tezo de Federico Gobbo, la nuna (kaj tria) Amsterdama katedestro.

Kiel interlingvisto, Jansen interesiĝis ĉefe pri la gramatiko de Esperanto, kiun li pristudis uzante la gramatikan teorion de la t.n. Amsterdama skolo de funkcigramatiko. Tiun skolon fondis la Amsterdama profesoro pri ĝenerala lingvistiko Simon Dik (1940–1995): temas pri matematike formaligita versio de la ideo ke la gramatiko de lingvo estas influata ĉefe de la lingvo-uzo en komunikado (kaj ne, ekzemple, de iu denaska kognitiva kompetento). La nuna Amsterdama profesoro pri ĝenerala lingvistiko, Kees Hengeveld, estas ankoraŭ la ĉefa proponanto de tiu teorio en la mondo. Laŭ mia takso, Jansen adoptis tiun teorion ne pro iu ideologia motivo, aŭ post longa komparo de diversaj lingvomodeloj, sed ĉefe pro praktikaj kialoj; tiel li povis pli bone kunlabori kun la aliaj Amsterdamaj lingvistoj. Jansen estis ĉiukampe pli praktikema ol ideologiema homo; eble pro la fakto ke li estis inĝeniero kiu ŝatis solvi praktikajn problemojn.

Jansen fakte unue studis spacan inĝenieradon en la Teknika Universitato de Delft (Nederlando) dum la jaroj 1965–1970. Li mem diris ke pro lia ‘inĝeniereca’ menso la ideoj de artefarita solvo por la lingvoproblemo, aŭ de artefarita lingvo, neniam estis strangaj por li. Tamen laŭ mi la plej grava temo en lia esperantologia verkaro estas la demando kio estas natura kaj kio estas artefarita en Esperanto. Por tio li uzis la amsterdaman funkcigramatikan teorion kiu volas esti universala teorio pri ĉiuj ‘naturaj’ lingvoj. Montrante ke ni povas kompreni ankaŭ la gramatikon de Esperanto en tiu kadro, oni pruvas ke Esperanto obeas la samajn principojn kiel ‘naturaj’ lingvoj.

En 2007 Jansen publikigis (nederlandlingve) *Woordvolgorde in het Esperanto* ([Vortordo en Esperanto], LOT Publications 2007), sian doktoriĝan disertacion, en kiu li kombinas diversajn empiriajn teknikojn (inter aliaj pristudo de diversaj tekstaroj, analizo de lerniloj kaj enketoj kun spertaj parolantoj) kun teorioj pri la prefero por la vortordo SVO (subjekto-verbo-objekto) en la ĉiutaga lingvo. Li finverkis tiun tezon sub la gvido de Hengeveld kaj de mi: Hengeveld estis la unua doktoriganto, kaj grave influis la tezon; mi estis tie ĉefe pro la esperantologiaj faktoj. Mi povas diri ke laŭ mi tiu tezo, espereble iam tradukota en iun internacian lingvon, estas unu el la plej gravaj esperantologiaj verkoj kiujn mi konas, pro la enhavo sed ankaŭ pro la klara stilo. En ĝi, Jansen montras ekzemple ke eĉ en lernolibroj kie la aŭtoro deklaras ke la vortordo de Esperanto estas tute libera, fakte pli al 90% de la frazoj havas la vortordon SVO, kaj la aliaj vortordoj oni povas ĉiam kompreni laŭ funkciaj bezonoj (ekzemple por meti novajn informojn je la fino). La tezo estas facile trovebla surrete. Mallonga Esperantlingva versio de tiu verko aperis en 2008 kiel *Naturaj vortordoj de Esperanto*, UEA). Post tio, Jansen verkis kelkajn artikolojn pri la morfologio de Esperanto, ĉefe por *Esperantologio*, sed ankaŭ por *Linguistics*. En la lasta revuo, li montras ekzemple kiel la ‘oficialaj’ reguloj por la uzo de la verbaj sufiksoj *iĝ* kaj *ig* kelkfoje estas problemaj por parolantoj, kaj kiel tiuj problemoj estas solvataj en la lingvo-uzo. Kiam li mortis, Esperantlingva libro pri tiu temo ĵus pretiĝis; ĝi espereble eldoniĝos ĉe eldonejo Bero. (Bedaŭrinde kiam mi skribas ĉi tiujn liniojn mi ankoraŭ ne vidis la tekston.)

Li ankaŭ verkis kelkajn pli personajn tekstojn pri Esperanto, ekzemple sian ‘inaŭguran paroladon’ (tio estas Nederlanda tradicio) kiel profesoro: *Esperanto, taal om van te houden* [Esperanto, aminda lingvo]. *Beletra Almanako* publikigis eseon en 2022 kun kelkaj memoroj el lia esperantista vivo, pri la kontaktoj de Jansen kun esperantistoj en centra kaj orienta Eŭropo en 1974. Lastatempe, Jansen ankaŭ finverkis tradukon de la teatraĵo ‘Vivo de Galilei’ de Bertolt Brecht.

Ankaŭ la patro de Jansen estis esperantisto. Juna Wim lernis la lingvon ĉar li trovis esperantlingvajn librojn en la gepatra domo kaj ne toleris ne kompreni pri kio ili parolis.

Jansen junaĝe ankaŭ iomete aktivis en la Esperanto-movado, ĉefe en Nederlando, kie li membris en la estraroj de Nederlanda Esperanto-Junularo kaj de Esperanto Nederland. Dum la naŭdekaj jaroj li ankaŭ verkis kelkajn informajn broŝurojn pri Esperanto en la nederlanda. Mi kredas ke dum tiuj jaroj li ankaŭ helpis starigi la katedron pri esperantologio en la universitato de Amsterdamo. Precipe dum la naŭdekaj jaroj, Jansen ankaŭ iom aktivis en lingvopolitika kampo, ne nur por Esperanto, sed ankaŭ por la nederlanda: en 2002 li publikigis la nederlandlingvan libron *Relax!* [Malstreĉiĝu!], komentante pri la, laŭ Jansen tro granda, influo de la angla.

Jansen renkontis sian italan edzinon Marisa dum Internacia Junulara Konferenco en Londono. En 2023 la paro festis 50 jarojn da geedzeco kun siaj 3 gefiloj kaj 8 genepoj. Post sia emeritiĝo Wim ne plu tiom aktivis en la movado, kvankam li ankoraŭ ĉiam havis varmajn rilatojn al kelkaj individuaj esperantistoj, sed li ekzemple ne plu estis membro de la landa asocio.

Estas eble malpli konate ke Jansen havis ankaŭ du aliajn esploristajn karierojn. Li laboris ĝis 1998 por Eŭropa Spaca Agentejo (ESA). Dum tiu laboro li publikigis i.a. *The Story of Moslab* ([La historio de Moslab], Noordwijk, European Space Agency, 1993) kaj *Biological Experiments on the Bion-10 Satellite* ([Biologiaj eksperimentoj en la satelito Bion-10], Noordwijk, European Space Agency, 2001; kune kun aliaj). Li ankaŭ pristudis en tiu kadro senpezecon, por kio li multe vojaĝis al Rusujo.

Krome, Jansen magistriĝis en la 80aj jaroj pri la eŭska lingvistiko en la Universitato de Leiden (Nederlando) sub la gvido de la elstara nederlanda eŭskologo Rudolf de Rijk (Wim estis lia sola studanto dum tiuj jaroj kaj entute De Rijk ne havis multajn studantojn). La iom 'ekzotika' karaktero de tiu eŭropa sed ne hindeŭropa lingvo altiris Jansen al profunda pristudo. En 1996 li publikigis la unuan vortaron Eŭskan-Nederlandan kaj Nederlandan-Eŭskan. Krome li ankaŭ estas la aŭtoro de anglalingva lernolibro de la eŭska (*Beginner's Basque* [La eŭska por komencantoj], Hippocrene Books Inc., New York, 2002), de traduko de infanlibro el la eŭska al la nederlanda (*Het geheim van het meer* [La sekreto de la lago], Groningen, Gopher Publishers, 2001), de libro pri la historio de la eŭskologio en Nederlando (*Veldwerkers en vrouwen in en om Baskenland* [Esploristoj kaj virinoj en kaj ĉirkaŭ Eŭskio], Leiden, Gingko, 2018), kaj multaj aliaj. Li kelkfoje ankaŭ kombinis sian intereson pri Esperanto kaj la eŭska; en 2016 aperis la lernolibro *Ni lernu la eŭskan* (kune kun la fama eŭska eŭskologo Aitor Arana) kaj en 2018 *Mil eŭskaj proverboj*.

Jansen estis multtalenta, modesta homo, kiu preferis teni iom da distanco. Li plurfoje malakceptis petojn membriĝi en la Akademio de Esperanto, por ne altiri tro da atento. Li estis ĉiam afabla, kaj vera sinjoro kies lingvouzo estis senpeka en ĉiuj ok lingvoj kiujn li parolis.

Pri la aŭtoro

Marc van Oostendorp (1967) estas profesoro pri Nederlanda lingvistiko en la Universitato Radboud en Nimego (Nederland). Antaŭe li deĵoris kiel profesoro en la universitatoj de Amsterdamo kaj Leiden, ambaŭ en Nederlando. Li estas prezidanto de la asocio Esperanto Nederland kaj membro de la Akademio de Esperanto.

Retadreso: marc.vanoostendorp@ru.nl

ORCID-numero: 0009-0000-8830-6976

About the author

Marc van Oostendorp (1967) is the Chair of Dutch linguistics at Radboud University in Nijmegen, the Netherlands. He previously occupied chairs at the universities of Amsterdam and Leiden, both in the Netherlands. He is the current president of the association Esperanto Nederland and member of the Academy of Esperanto.

Over de auteur

Marc van Oostendorp (1967) is hoogleraar Nederlandse taalkunde aan de Radboud Universiteit in Nijmegen. Eerder werkte hij als hoogleraar aan de universiteiten van Amsterdam en Leiden. Hij is tegenwoordig ook voorzitter van de vereniging Esperanto Nederland en lid van de Esperanto-Academie.

Wim Jansen (1948–2024). Obituary

Summary: The renowned interlinguist Wim Jansen passed away in February 2024. He was known for his publications on Esperanto grammar and for his many years as a professor of Interlinguistics and Esperanto at the University of Amsterdam, but he was also an engineer in space technology and a specialist in the Basque language.

Keywords: Wim Jansen; Esperantology; Esperanto grammar; Functional grammar

Wim Jansen (1948–2024). In memoriam

Samenvatting: De gerenommeerde interlinguïst Wim Jansen overleed in februari 2024. Hij stond bekend om zijn publicaties over de grammatica van het Esperanto en vanwege zijn vele jaren als hoogleraar Interlinguïstiek en Esperanto aan de Universiteit van Amsterdam, maar hij was daarnaast ingenieur in de ruimtetechnologie en specialist in de Baskische taal.

Sleutelwoorden: Wim Jansen; esperantologie; esperanto-grammatica; functionele grammatica